

La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia
Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio:

BOX 1367, ELIZABETH STREET P.O., MELBOURNE
(AUSTRALIO).

N-ro 30. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Decbr., 1922. Price 4d.

The Australasian Esperanto Association.

AFFILIATED GROUPS.

- Belgrave.**—(E. Grupo). Fino S. Giles.
"Warawing," South Belgrave.
- Brisbane.**—E. Klub, Sro. Sycamore.
"Bonvenu," O'Mara St., Lutwyche,
Brisbane.
- Hobart.**—Esperanto Society, Sro. E. F.
Heritage, 35 Riedon St., Newtown
Hobart.
- Melbourne.**—Hardware Chambers, 350
Little Collins St., Friday, 8 p.m.
Rationalista Esperanta Grupo.
Temperance Hall, Melbourne.
- Mont Albert.**—Sek., Fino B. K. Blythe
19 Victoria Ave., Surrey Hills.
- Northcote.**—(La Verda Stelo). Sek.,
Sro. G. Delaney, 16 Gordon Grove,
Northcote.
- Oakleigh.**—(Iru Antaŭen). Sek., Sino.
R. Bigelow, Rangaroo Rd., Oak-
leigh.
- Rabaul.**—(Nov. Guineo, E. Grupo). Sro.
F. Simon, Rabaul, New Guinea.
- Sandringham.**—(Marborda Grupo).
Fino M. Hollow, "Portcuth," Bam-
field St., Sandringham.
- S. Australia.**—Esperanto Society, Sro.
W. L. Waterman, 20 Henley St.,
Torrensville, S.A.
- Sydney.**—Esperanto Society, Sro. L.
Foster, "Edna," Chasold Parade,
Campsie, N.S.W.
- Townsville.**—Esperanto Society, Sro.
Chas. Price, School of Arts, Stan-
ley St., Townsville.
- W. Australia.**—(Nigra Glyna Grupo).
Fino F. Cherrett, 45 Leonard St.,
Victoria Park, Perth, W.A.
- Whangarei.**—Sro. W. H. King, P.O.
Whangarei Nth., Auckland, N.Z.

Chocolate Bowl Sweets.

Made Specially for "My Lady's" delectation. Available in choice and exclusive varieties daintily packed. Phone your next order, or write for particulars of these "Made-to-Day" Sweets. We supply quantities to suit individual requirements.

ASK FOR

Chocolate Bowl Sweets at Confectioners—All Suburbs.

Esperanto entrepreno—Deziras korespondi kun samfakanoj en Usono, Svisujo, Francujo, Rusujo, kaj Aŭstrujo, pri farado de ĉokoladaj sukeraĵoj.

18 CENTREWAY, COLLINS STREET

Telephone: Central 2210.

Universal Esperanto Association.

Founded, 1908.

Objects:

To spread the use of the international help language Esperanto.

To facilitate communication between the peoples without distinction of race, nationality, religion or language.

To institute international services available by everyone whose intellec-

tual and material interests extend beyond the limits of their own country

Delegates in every country.

Membership, 5/- per annum, or with the monthly magazine "Esperanto," 12s. 6d.

Subscriptions for 1923 are now payable to—

O. W. BALLARD (Delegate for Melbourne and Chief Delegate for Australia),
27 Lansdowne Road, East St. Kilda, Victoria.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Gis la 7a de decembro ni ricevis la jenajn sumojn:—

L. Nesbit, 4/6; M. A. L. Hang, 5/-; S. Ruchin, 5/-; Ostler, 4/6; — Widowson, 4/6; M. Dodd, 4/6; E. M. Wallace, 5/-; Uyeno Trading Co., 5/-; J. Mader, 5/0; J. A. Hodges, 5/-; M. Cohen, 4/6; P. Hudson, 9/-; T. O'Leary, 4/6; C. L. Clarke, 4/6; — Parker, 4/6; A. L. Walford, 4/6; P. T. B. Hudson, £2/10/-; Marborda E. Grupo, 4/6; J. McKenna, 4/6; H. V. Tilbury, 4/6; A. Greiser, 10/-; A. H. Slade, 5/-; T. Corrigan, 4/6; F. Tondit, 4/6; F. Paulsen, 5/-; W. C. Dalglish, 4/6.

Cu vi registris vian Nomon en la 5a Eldono de la Adresaro de Esperantistoj el la mondo? Baldaŭ Aperos. Tuj sendu vian nomon kune kun, 1/6 al Sro. A. R. Cohen, Box 731, P.O. Melbourne.

KOMERCA ANONCO.

Do you wish to acquire extra lines from Europe?

I have several good lines to offer, and can arrange for representation.

Agencies secured from any country.

A. R. COHEN, P.O. Box 731, Melb.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str. P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Aĝono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 30, Melburno (Melbourne), Australio. 10 Decembro, 1922.

ESPERANTO IN SCHOOLS DESIRED BY N.S.W. TEACHERS.

At a meeting of the council of the Teachers' Federation of New South Wales, held in Sydney, on 25th November, the sub-committee appointed to inquire into the relative merits of the two leading auxiliary languages and as to the advisability of introducing the study of the one selected into the State system of education, presented its report. The committee found that Esperanto was the most suitable auxiliary language, that its introduction into the State schools was practicable, and recommended that the department be requested to fall in with the expressed wish of a large section of the League of Nations. It was suggested that an experimental class of pupils from 12 to 14 years of age should be formed, and placed in charge of a competent teacher. The report was adopted, and is to be forwarded to the Minister for Education.

LA PREZIDANTO DE LA A.E.A.

Oni anoncis la rezultaton de la balotado por la ofico de Prezidanto de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio por la jaro 1923. S-ro. A. R. Cohen estis elektita. Li plene meritas la honoron kaj la asocienoj povas gratuli sin, ke ili havas tre entuziasman kaj laboreman gvidanton.

CONGRESS AFFAIRS.

Samideanoj,—

I wish to draw the attention of readers of the Suda Kruco to the following:—

That congress affairs are progressing very favorably in Sydney. That the committee have arrangements well in hand.

That visitors are assured of a good time.

That we intend to stage—as one of our star items—an esperanto concert, when samideanoj will be able again to show to the public that our language can be used for speech and song.

That the committee earnestly request financial assistance from every Esperantist, whether they intend coming or not.

That the success of the Kvara means much to our movement in Australasia. We must not fail, we shall not fail, if you give us the support which is due. Already we have 25 subscribers from six different States, and we require, at the least, one hundred.

Samideanoj! Who will make the 26th, etc., etc.?

Send your subscriptions or donations immediately to the secretary.

L. E. FOSTO,

Clissold Parade, Campsie, N.S.W.

KRONIKO.

MELBURN, V.—Dum novembro, ĉe la Aŭstralia Instituto de la Artoj kaj la Literaturo, fraŭlino E. A. Sinnotte, kiu estas membro de tiu instituto, legis longan kaj tre interesan pri Esperanta literaturo artikolon, kiun ŝi mem verkis. Kvankam la instituto havas nenian rilaton kun la Esperanta movado, fraŭlino Sinnotte sukcesis ricevi permeson por tuta por Esperanto programo, kelkaj tre dolĉaj Esperantaj kantoj estis bone akceptitaj, kaj ankau deklamado de "Esti-au ne esti!" el "Hamleto." Sroj Hudson kaj Rawson mallonge priskribis kelkajn spertojn de siaj vojaĝoj.

Lastatempe gajnis la diplomon de la B.E.A. la sekvantaj Melburnanoj. E. S. Hanks, J. G. Pyke, Dr. F. J. Williams, P. S. Wyatt kaj la sekvantaj Nov-Zelandanoj. W. H. King, R. Ross.

POR LA U.E.A.

En la Australian Church Hall, novembron 15 an, por plialproksimiĝi al la celata aŭstralia donaco de £50 al la U.E.A., okazis koncerto kaj monkollekto, kiu aldonis £6/10/- al la jam ricevita sumo.

La koncerto malfermis per ĥora kanto de "La Vera Frataro." Sekvis tion kanto de Sro-Davidson, nova Esperantisto kun bela voĉo, kiun, esperable, li ofte levos en Esperantaj kantoj. La sekvanta ero, prezentado de dramo titolita, "Sinjoro Herkules," estis ankaŭ peno de komencantaj Esperantistoj, se oni esceptas unu sinjoron. Tre naive dolĉa estis la aktado de Fraŭlino L. Walford kiel "Anjo," ĉambristino ĉe la hotelo "Blua Simio"; Fraŭlino M. Lacey tiel bone prezentis sian malgrandan rolon de "Ernestino," modesta flino de edukeja direktoro, ke estas flustrite, ke ŝi povas teni sin preta por pli granda laboro! Sinjoro Sime, "Augusto," amanto de "Anjo" kaj servisto ĉe la "Blua Simio," havis multajn okazojn por esti komike amuza, kaj li tiujn lerte kaptis. Sro. John Roberts, kiel "Krianto," direktoro de cirko serĉanta "la Herkules de la mondo," estis vigla kaj konvinka. Sro. Percy Roberts, la hontema instruista kandidato, "Muso," kiun "Krianto" erare akceptis kiel "la Herkules de

la mondo" montris intelligentan komprenon de sia rolo. Sro. A. R. Cohen, kiu estis, "Malman," maljuna, digna direktoro de edukejo erare akceptita kiel direktoro de cirko, lerte plenumis la rolon. La lasta sed certe ne la malplej grava estis "la Herkules de la Mondo" mem "Cezaro," prenita de Sro. L. Brotchie, amuze kaj Herkulese. Poste, per sia bone konata lerteco. Sinjorino C. Booth ludis pianan solon. Fraŭlino M. Dowling sekvis kun tre dolĉe kantita "Melisande" esperantigita. La aŭdantaro aplaŭde petis ankoraŭ alian kanton kaj la fraŭlino kompleze kantis "Mia Verda Stelulino." La plena kontralta voĉo de Fraŭlino Bate aŭdiĝis bele en "En Kvietanta monteto" kaj "Rozo Erikeja." Sinjoro Davidson bonege kantis "Vespera Stelo" el Tannhauser; la aŭdantaro postulis ke li rekantu ĝin. Per du malnove preferataj kantoj Sinjoro Brooks-Gray ĉarmis la ĉeestantojn. Ili estas "Anjo Loro," kaj "La Rompita Ringo."

La unuakta komedieto, "Ŝia moŝto Lady Fanny," kiun Fraŭlino Elsie Godfrey, kaj Sinjoroj Roy Rawson kaj George Hussey ludis, pravis la taŭgecon de nia kara lingvo por spritaj ludoj. La temo kaj la prezentado estas tre modernaj. Lady Fanny, filino de duko, volas eksdezigi sian edzon pro tio, ke li ne aĉetos perlojn por ŝi. Li ne estas sufiĉe riĉa. Unu ero el la kulpoj kiun oni devas prui antaŭ ol oni povas eksdezigi edzon estas la krueleco. La edzo de Lady Fanny devas bati ŝin en la ĉesto de persono, tial li sonorigis por la ĉefservisto. Tiu persono eniris kiam la edzo batas la edzinon. Vidante la frapon, la ĉefservisto ĵetis la edzon sur la plankon. Estas surprizo por la edzino. Si vidas ke servisto povas esti ankaŭ viro. Unue Lady Fanny diras al li ke si kaj la edzo proviudis teatraĵon, sed poste si klarigis, ke ŝi volas eksdeziniĝi. La ĉefservisto gentile proponis ke la plej facila maniero estas por la edzino foriri kun viro. Li eĉ proponis virojn inter la amikoj de sia mastrino. Fine li proponis sin mem. Lady Fanny estas kortuŝita je la ĝentila maniero de la propono. Bedaŭrinde la ekonomio venkas. Lady Fanny devas resti kun la edzo pro la manko de mono de ŝia servisto, kaj tiu servisto devas foriri—li

ne povos resti ĉefservisto post kiam oni lernis ke li estas viro!

La festo finiĝis per kantado de "La Espero."

LA UNUA . . . EN ESPERANTISMO.

Memorindaj datoj el la historio de Esperanto.

La unua broŝuro pri Esperanto aperis en la jaro 1887 (la 26an de julio); ĝi estis rusa 40paĝa broŝuro titolita: D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro. Por Rusoj. Varsovio. Tipolitografio de H. Kelter, str. Nomoŭpŭle N-ro 11. 1887. Prezo 15 kopekoj.

La unua broŝuro en Esperanto aperis en la komenco de la jaro 1888a sub titolo: D-ro Esperanto. Dua libro de l'lingvo internacia. Kajero N-ro 1. Varsovio 1888. Kosto 25 kopekoj.

La unua artikolo pri Esperanto en nacia gazeto aperis en Varsovia „Kurjer codzienny“ (Ĉiutaga kuriero) en la jaro 1887 (la 7an de aŭgusto N-ro 216) kun titolo „Antivolapuk“ kaj kun subskribo W. S. (=Wladyslaw Sabowski).

La unua esperanta gazeto estis „La Esperantisto“ eldonata en Nurnberg dum la jaroj 1889 ĝis 1895 (anstaŭita poste per „Lingvo internacia“ eliranta dum la jaroj 1896 ĝis 1915 komence en Svedujo (Upsala) poste en Hungario, Budapeŝto, kaj fine en Francujo (Paris).

La unua literatura traduko en Esperanto estis „La neĝa blovado“ de Puŝkin, verketo tradukita de Antoni Grabowski! La unua adresaro de Esperantistoj estis eldonata de D-ro Zamenhof, aperis dudek tri serioj parte en la gazeto, „La Esperantisto“, parte memstare kiel ĉiujaraj broŝuroj (ĝia daŭrigo estis „Tutmonda adresaro“ de Hachette eldonata de la jaro 1904).

La unua interparolo en (la nuna) Esperanto okazis inter d-ro Zamenhof kaj inĝeniero A. Grabowski (tamen la unua persono, kun kiu Zamenhof parolis sian lingvon diferenca ankoraŭ de la nuna Esperanto, estis lia kolego d-ro Aleksandro Waldenberg—en Zakroczyń 1885).

La unua Esperantista societo estis

fondita en Nurnberg, kie la tiama societo de volapukistoj ŝanĝiĝis en la societon de Esperantistoj (1888).

La unua internacia kongreso de Esperanto okazis en la jaro 1905 (de la 5 ĝis la 13 de aŭgusto) en la Franca marborda urbo Boulogne sur mer; de tiu ĉi tempo ili okazas ĉiujare escepte la tempon de la monda milito.

La unua raporto pri Esperanto en scienca institucio estis tiu de prof. d-ro E. Naville, en la franca Akademio de la sciencoj en la jaro 1899 sub titolo „La lingvo internacia“.

La unua Esperanta raporto en scienca kongreso estis tiu de d-ro Krikortz „Pri la kuracado per varmĉi prezentita al la kongreso de fizioterapio (Liege 1905).

La unua teatra prezentado en Esperanto estis organizita de Aleks. Zakrzewski en la jaro 1896 (15./27 de septembro) en Smolensk; oni ludis la komedion „Brandfaristo“ de Tolstoj; kompreneble ĝi estis ludata de dilektantoj. La unua esperanta teatra prezentado de profesiaj aktoroj artistoj okazis en Dresden dum la kvara internacia kongreso de Esperantistoj (1908); oni prezentis teatraĵojn „Ifigenio en Taŭrido“ de Goethe.

La unua preĝeja kantado estis organizita de Aleks. Zakrzewski en Romkatolika preĝejo de Smolensk en la jaro 1896 (26an de oktobro).

La unua literatura konkurso en Esperanto estis organizita en Odessa, kie Gernet redaktis „Bibliotekon.“

—(El „Nova Europo.)

S-INO. ZAMENHOF AL AŬSTRALIANO.

S-ro. Pyke skribis al s-ino Zamenhof samtempe sendante fotografajon de sia librovendejo. Responde li ricevis la jenon:—

“Estimata sinjoro, mi danke ricevis vian leteron. Mi tre ĝojas pro via laborado por nia kara lingvo en via bela lando. Mi esperas, ke nia movado ĉiam pligrandiĝos dank' al via librejo mi deziras al vi plenan sukceson. Laboru kaj esperu. Koregan saluton sendas al vi via samideanino.

KLARA ZAMENHOF.”

HARPO.

(A. Lunaĉarski.)

Mi dum longa tempo apartenis al maljuna kantoro en malgranda vilaĝo. Kie kaj kiam mi naskiĝis, mi ne memoras. Muzikiloj akiras spiritajn ecojn kaj konscion nur poste: ilia animo vekigas sole dank'al homa animo, kontaktigante kun ĝi en la reĝolando de sonoj.

Tie, en malgranda vilaĝo, en maljunula ĉambro pasis mia mizera ekzistado. Tamen, ĝi ne ŝajnis al mi tro plendinda: mi amis mian virtuozon. Li estis la unua, kiu vekis en mi belajn sonojn. Mi estis ĝoja sonori laŭte, akompanante ĥoron da freŝaj infanaj voĉoj. "Ekzistas nenio pli bela,—mi pensis,—jen estas muziko, jen estas amo". Estis nur strange, ke iujn kordojn la kantoro neniam tuŝis. La duono da kordoj sonadis konstante, klare, konsecie, diversmaniere,—aliaj sonadis kaj tremis nur malofte, mi konsciadis ilin konfuze, malprecize, ili ŝajnis al mi mizeraj, palaj. Sed kelkaj kordoj silentis,—tamen mi sciis, ke mi ilin havas..

Iun tagon mi staris ĉe malfermita fenestro. La luno lumradiis en la ĉielo; poploj trembriletis per siaj arĝentkoloraj folioj,—ilin karesis venteto kaj benis lazura lunlumo. Kaj jen la vento ekblovetis tra la fenestro kaj ektuŝis per sia spiro miajn kordojn,—kaj ili ĉiuj aŭdigis malfortan ĝemon,—eĉ tiuj ekĝemis, kiuj ĉiam silentis. Tiam mi eksopiris por momento. Ha, kiel mi eksopiris! Ĉiuj silentintaj ĝis nun kordoj ekmurmuretis: "Ankoraŭ!" Tamen la vento ne tuŝis ilin plu. Sed ili volis kanti.. Ĉu la ĉirkaŭaj objektoj, ĉu la homoj komprenis, ke mi petegas, ke oni permesu al mi kanti, ke mi soifas pri sonado, ĉar mi vivas, ĝuas kaj amas?.. Ho, se mi povus eksoni per ĉiuj miaj kordoj!.. Sed, kredeble, ili estas malbelaj,—la homoj ne bezonas ilin; sole iuj estas necesaj por ili; aliajn ili tuŝas malofte, ili estas malfortaj kaj mizeraj; sed multaj, multaj kordoj estas malhejmaj por ili kaj ili evitas ilin.. Kiam la kantoro min alproksimiĝadis, mi estis ravita, mi volonte fordonadis min, kantis kaj revis: tuj li ektuŝos tiujn forrifuzitajn, ne vekigintajn kordojn. Ne,—li ĉiam evitadis ilin, obstine ludante ĉiam la samajn melodiojn. Certe,

tiuj melodioj estas perloj de beleco, triumfkronoj de muziko. Kiam danko mi estas al mia virtuozo!

Iun tagon mi staris sola, enprofundiĝinta en mian duondormon de duonanimita korpo. Subite aŭdigis voĉoj. Uru—sonriĉa, laŭta. Eniras mia kantoro en sia flaviĝinta redingoto, larĝa pantalone, kun kalva kapo kaj larmumaj okuloj, kaj post li—altreska maljunulo en la gloro de siaj arĝentkoloraj bukloj, kun brilaj nigraj okuloj. Potenco sentiĝas en liaj lipoj, en liaj gestoj. Li laŭte parolis.

— Vi do fariĝis kantoro, maljunuloĉjo? Vi instruas kantadon al katidoj kaj hundidoj? Sur kiu muzikilo vi do kunludas?

— Jen ĝi estas,—diris gaje mia posedanto, montrante min per fingro.

— Sur harpo?—demandis la mirinda nekonatulo kaj metis sur min sian nervan manon.—Nobla instrumento, se iu scipovas ludi ĝin.

— Ĝi ne estas agordita. Mi ludas ja ĉiam la samon.

— Ĉu vi aŭdis, maljunuloĉjo, mian muzikon "Ploro de Izraelidoj"? Ne? Nu, aŭskultu do.

Kaj li prenis min, ĉirkaŭvolvis per siaj varmaj manoj. Li iom streĉis kelkajn kordojn, tremetantajn sub liaj fingroj. Kaj subite,—ho, Dio! Ĉu ĝi estas mi?.. Kiaj anĝelaj ekspiroj plenigis la ĉambron, kia oro, kiaj preĝoj, kiaj puraj larmoj! Kiaj plorkemoj versiĝis el-sub la karaj fingroj, kiujn mi kisis, kiaj profundaj malfermiĝis!..

La sonoj kreskis, tondris.. Nun sonis venĝo: mi tuta tremis por neniam spertita kolerio, mi alvokis malbenojn.. Silentis la maljuna kantoro, silentis la homamaso sub la fenestro, tumulte leviĝadis la brusto de l'inspiroplena majstro,— kaj mi sonis pro feliĉo de nova vivo. Jen do estas muziko, jen estas vivo! Jen kiaj estas la kordoj, kiujn mi mem komencis malŝati, kiuj kvazaŭ mortadis en la mallumo de silento.

Kiom da feliĉo li malkovris al mi! Li ludis "Kanton de Kantoj", kaj mi ploris pro pasio, sonoris per arda varmego, tremis, murmuretis, formortante.. Li malkovris al mi tutan mondon en mi mem... Ho, vivo! Ĉi estas nemezureble bela. Ho, mia estro, reĝo, sorĉisto, mia dio!.. Kaj li diris: "De kie vi havas tian instru-

menton? Mi donacos al vi belan harmoniumon, kaj vi cedu al mi vian belulinon. Kia formo, kia voĉo. Malofta harpo!"

Kaj li prenis min.

(El la rusa lingvo tradukis. D-ro Andreo Fiŝer, L. K. (Tiflis). en "La Nova Epoko").

THE INTERNATIONAL LABOUR OFFICE.

This organisation which is attached to the League of Nations now sends reports of its activities to the press of the whole world. "Recognising the value and importance of Esperanto as a medium of intercommunication" it has been decided to send these bulletins in Esperanto to the Esperanto press.

These documents should be translated into English and published by the Labour Press. This is a matter that should receive attention from those interested in the Labour problem. The reports are filed and will be available for anyone wishing to make use of them. The space available in the Suda Kruco will not permit of publication of this information in extenso, but an endeavour will be made to summarise it.

The Budget Committee of the Third Session of the League of Nations has decided to recommend that £120,000 be voted for the construction of a building for the International Labour Office. This building will be erected on land, given by the Swiss Government, and worth £50,000.

Mr. Cesar Zumeta, Venezuelan delegate to the Third Session of the League of Nations, delivered an address to the Directors of the Labour Office. He sketched the history of industry from the early gold-seeking days, alluded to the improvement in agricultural and industrial conditions, and made reference to the immigration problem.

The Fourth International Labour Conference was held during October, under the Presidency of Lord Burnham. One of the matters dealt with was the ensuring of regular information concerning immigration and emigration, arranged according to a uniform system so as to afford easy reference and comparison.

The Conference also considered a re-

form of the Advisory Council, as some countries outside Europe had become anxious through the expense caused them through annual sessions.

The second edition of the International Labour Directory has just appeared. This volume is printed in English, French and German, and contains information, not elsewhere obtainable, regarding Government departments and private organisations dealing with the Labour problem and industry in 72 countries. The book contains 1000 pages.

A recent bulletin deals with the present cost of living figures throughout the world and shows that, except in those European countries where special causes have influenced the value of their currencies, the cost of living and retail prices in the majority of countries are substantially lower than during the first quarter of this year.

Dame Rachel Crowdy, secretary of the Advisory Committee of the League of Nations, regarding the traffic in women and children, was invited to attend the sittings of the Labour Conference which dealt with the question of emigration. The available statistics do not always show the sex of the emigrant. This factor is of great importance, and indication of sex will be specially useful to the International Labour Office for the eventual application of protective measures favourable to emigrants. Accordingly, it was proposed that all States compile their information according to a uniform system in relation to sex, age, family relationship and occupation.

EL RIMOJ KAJ RITMOJ.

Se kreas kor'—el ĝiaj fendoj
Elkreas flor' de rememor'
Trankvilaj ĝin movigas plendoj
Venen' eliras per odor...

Venen' per bonodor' eliras
El sangkolora tiu flor'...
Dum nokt' sendorma vi ĝin spiras
Serĉante ĝuon en dolor'...

En rememor' vi amuziĝas,
Je multkolora florfoli'—
Vizaĝ' paliĝas... kaj paliĝas...
Mortigas vin melankoli'...

Leo Belmont, en Pola Esperantisto.

Esperanto estas tiel harmonia kiel la itala lingvo, klara kiel la franca, sufiĉa kiel la greka.—Charles Richet, profesoro, Paris.

TRANSLATION EXERCISE.

The following translation, by Mrs. F. Trewin, of Bayswater, Victoria, is the best that has reached us.

Dum ĉirkaŭ unu horo nenio estis dirita krom negravaĵoj. Ankoraŭ ne parolis la sinjoro; la sinjorinoj, kun laŭtaj ekkrioj ŝajnis babili sen ia pripensado. La sinjoro, kun ĉiu virseksa stulteco de silenta rememoro, nedirante eĉ unu silabon, ŝajne estis prezentanta al si la pantomimon de la pensoj. Mi ja ne povas diri, ke lia vizaĝo tiel false atestis pri lia intelekto, ke ĝi ion esprimis. Ne, mi ne faru al li tian nejustecon; li povus esti pozanta figuron de sensentleco. Mi toleris lian silenton, pensante, ke ju pli longe li kolektas, precizigas kaj aranĝas siajn ideojn, des pli li ĉarmos min per la fluo de sia oratora elokventeco, kiam liaj konversaciaj materialoj pretiĝos por elmontri. Sed, ho ve, ne venis al mi en la kapon, ke mi estas vidinta malplanan botelon ŝtopitan tute same, kiel plena. Fine la baritaj elokventaj povoj elŝprucis, kaj, kun egale tiom de spiriteco, kiom da noveco de elpenso kaj profundo de penetro, li rimarkigis, ke ni estas ricevintaj nenian someron. Tiam, konsternite pro sia propra multvorteco, li duoble ŝlosis la pordon de siaj lipoj.

SUGESTIAJ NOTOJ.

Estis dirita.—“Dirata” is better here, to emphasise the continuity.

Negravaĵoj.—Reasonable fidelity to the original is expected. A suitable rendering would be “krom vortoj kiuj signifis preskaŭ nenio.”

Ĉiu virseksa, etc. — Probably this would not be understood by one who had not read the original. Substitute “kun la tuta stulteco de viroj kiam ili silente rememoras.”

Prezentanta.—“Traludanta” is perhaps a better word.

Al si.—This would be better omitted, as the persons present received the benefit of his conduct.

“Pensoj.”—“Pensado” is what is meant.

Tian neĵustecon.—“Tiun” should be used, as it is not a kind of injustice, but a definite individual one that is meant; “injustice” meaning “a wrong” is “maljustaĵo.”

“Figuron de sensentleco.”—A better expression is “portreton de Senkonscio.”

“Precizigas, etc.”—Perhaps “alprezigas kaj ordigas” would be clearer.

Botelon, etc.—The meaning of the English is better brought out by “malplanan botelon ŝtopita tiel firme kiel plenan.” “Stopita” is predicative, and “plena” is not.

Egale tiom da, etc.—The phrase could be shortened with advantage, “kun egale akra sprito, nova elpenso kaj profunda penetremo.”

Konsterninte.—“Skandaliginte” is the right word (see Millidge).

(B.C.B.)

RECENZOJ.

LUMO SUR LA VOJON KAJ KARMO. Verkita de Mabel Collins, tradukita de O. Collin. 31 pĝ. Eldonis Teozofia Esperanta Ligo, Praha, Krakovska 17. 1922. Prezo: 5 kc.

Reguloj por la gvidado de Teozofoj. La originalaj reguloj estas verkitaj en arkaika formo de la sanskrita kaj poste tradukitaj en la grekan lingvon. Lernanto de la tradukinto transdonis ilin al Mabel Collins kaj la esperanta eldono estas traduko el ŝia angla verko. La mallonga artikolo pri “Karmo” enhavas konsilojn por novaj disĉiploj. (C.W.B.).

UNUA LEGOLIBRETO (Rakontoj, fabeloj, kaj popol-legendoj). DUA LEGOLIBRETO, (El literaturo, arto kaj scienco). Kolektita de K. Bruggermann. Eldonoj n-roj. 1 kaj 2 de la Universala Biblioteko Friedrich Ader, Dresden.

Ĉi tiuj libretoj estas malkaraj, la formato estas oportuna por la poŝo kaj la enhavo estas interesa kvankam ne tre nova por ni angle parolantoj; sed tio ne devas surprizi nin, ĉar la angla lingvo estas tre riĉa je tradukoj. Ĉu konatajn ĉu nekonatajn ĉiu ŝatos legi ĉi tiujn eltiraĵojn el deko da mondfamaj libroj, (C.W.B.).

En “La Suda Kruco,” (oktobra numero, pĝ. 31), estas dirite, ke la firmao Ferdinand Hirt & Sohn, Salomonstr. 15, Leipzig, grandamase eldonos esperantaĵojn. Kun ĝojo ni vidas la aperon de kelkaj libroj. La A.E.A. havas provizon; legu la anoncon sur la tria paĝo de nia kovrilo. La plej granda el la libroj estas—

STRANGA HEREDAĴO, originala romano verkita de H. A. Lukylen,

F.B.E.A., aŭtoro de "Paŭlo Debenham" kaj "Mirinda Amo." Ĉi tiu romano havas amplekson da 320 paĝoj kaj estas havebla ĉe Aŭstralazia Esperanto-Asocio, po 2s. 2d. broŝurite aŭ 3s. 0d. bndite.

Pri la temo mi diros nenion, ĉar la intereso de la legonto ne devas esti malfortigita per priskriboj de la faradoj de la personaro. Sed pro la lingva stilo mi povas senhezite rekomendi la libron al ĉiu, kiu amas legi fluan, bonstilan verkon. En siaj antaŭaj verkoj la aŭtoro montris ke li havas rimarkindan esprimopovon kaj en la nuna li denove montras ke lia lerteco kiel rakontanto kaj ankaŭ kiel elpensanto de trafaj esprimoj ne forlasas lin. (C.W.B.)

INTERNACIA KANTARO. Kolekto de 64 popolaj kantoj el 26 nacioj kun aldono de 3 famaj koncertarioj: Händel, G. F. Recitativo kaj ario "Delikataj vi folioj" el la opero "Xerxes". Mozart, W. A., Ario "Dolĉa amo, plena de ĝemoj" el la opero "La edziĝo de Figaro". Wagner, R., Ario "Funebre kovras la krepusko valon", el la opera "Tannhäuser".

Muzika eldono aranĝita de Josef Aĉtĉelik, iama orkestrestro de la opero en Leipzig.

La muzika eldono enhavas 67 pecojn de muziko, bele presitajn sur bona papero en tre oportuna formato. La esperantaj vortoj de la unua strofo estas presitaj sub la muzika notaro kaj la ceterajn strofojn oni trovas en aparta libreto.

La arioj estas rikoltitaj el ĉiuj landoj kaj se oni plene uzos ĉi tiun trezoron de melodio la taŭgeco de Esperanto kiel kantolingvo estos metata antaŭ la publiko kun pli da facileco ol ĝis nun estis eble. (C.W.B.)

STAMATOV, G. P.: Nuntempaj RAKONTOJ el la bulgara originalo trad. Ivan H. Krestanoff. 80 paĝoj. Enhavo: 1. Vilao apud la maro. 2. En la tombejo. 3. La estinteco. 4. Pri unu anguleto de l'animo. 5. Du talentoj.

Ĉi tiuj kvin noveloj de nuntempa bulgara verkisto, Stamatov, malkovras al la mondo ekstere de Bulgarujo mallongajn rakontojn iom similajn al tiuj de Edgar Allan Poe, sed nehavantajn lian malsanecan stilon. La tradukinto, Krestanoff, estas en la unua rango de Esperantaj stilistoj kaj de ĉiu vidpunkto la libreto estas tre alloga. (C.W.B.)

HERE AND THERE.

The Brazilian Parliament has voted a subsidy of 1500 milreis (about £50) to the Brazila Esperantista Ligo. About the time when this vote was passed Senor de Rio Branco, the Brazilian delegate at the League of Nations, was showing some hostility to Esperanto. It would seem that the delegate in question is not in touch with the public opinion of his homeland, where a knowledge of Esperanto by postal and telegraph officials is recommended by the responsible minister, where the Parliament makes a money vote for the purpose of aiding in the spread of Esperanto, and where an Esperanto course is being conducted at the Police Headquarters to prepare policemen to help foreign visitors at the national Centenary Exposition.

China is showing notable activity; a Sunday course for beginners at the French concession in Shanghai with 44 students is reported. The Chinese public school at Wusung has a Sunday course with 40 pupils. At Pekin University—a free student body after the style of mediaeval universities, we believe—samideano Eroshenko, the blind Bahaj enthusiast, is helping in an Esperanto course with 251 students. In Kwangtung all schools are reported to have put Esperanto into the curriculum.

"Verda Ombro" of Formosa is translating Hamlet into Japanese from the Esperanto version in parallel column.

The Eighth Italian Congress was held in Trieste during September. About 150 delegates attended and represented 1700 to 1800 members of the Italian Federation.

Mr. Okumija, Mayor of Jokosuka (Japan) is very favourably inclined towards Esperanto. He has lately circularised the schools in that town advocating the teaching of Esperanto as an optional subject. He is the first Mayor in Japan who not only approves of Esperanto but makes practical use of it.

Doctor Šimonek, of Chicago, was a member of the notable Rumanian Esperanto Congress at Cluj, which turned out to be a veritable international congress, owing to the presence of many samideanoj from Hungary, Germany, Russia and Bulgaria. The congress was a great success not only as a demonstration of Esperanto, but as an

aid to greater friendliness between the Balkan peoples. All the magazines of the land took notice, some with special reports and articles in Esperanto. The queen, and the ministers of arts and science, and of public instruction, sent greetings.

The Geneva Manifesto to teachers has now been translated and published in eight or more languages. The translations make an interesting collection.

The Bolivian Esperanto Association was founded on the 10th of June at Oruro, Bolivia.

FESTO DE LA MELBURNA KLUBO

La Melburna Esperanta Klubo solenis la daton de naskiĝo de Doktoro Zamenhof per koncerto kaj teatraĵo en la Austral Salon, sabaton, 9an de decembro. Malgraŭ la varmega vetero ĉirkaŭ 200 interesatoj ĉeestis kaj ŝajne plene aprobis la programon. Orkestro ludis uverturon, samidearoj kaj samideaninoj kantis, sed la ĉefa afero estis la ludo de la drametoj "Lady Fanny" kaj "La Kara Formortinto." La lasta ne sukcesis tiel bone kiel la unua, eble pro nesufiĉa preparado; tial la servoj de la sufloranto estis ofte necesaj. Dum la vespero oni faris monkollekton por helpi la starigon en Varsovio de monumento super la tombo de Doktoro Zamenhof.

Se vi estas sprita oni vin malamos. Se vi estas malsprita, oni ridigos pri vi. Verŝajne la plej bona afero estas ke ni neniel atentu kion oni diras por aŭ kontraŭ.

POSTISTOJ HAVIS KUNVENON.

La poŝtistoj havis specialan kunvenon en Helsinki sub la prez. de S-ro Spielmann. La asocio havas nun 3,000 membrojn, inter kiuj: 277 en Ĉeĥo-Slovakujo, 75 en Holando, 250 en Ameriko, 150 en Francujo, 23 en Estonujo. Novaj naciaj vicprez.: S-roj di Rienzi (Paris), Lisac (Rogatica), A. Couto Fernandez (Rio de Janeiro), Hubert (Karlovy Var), Modenov (Moskvo). La prez., S-ro Reber, ellaboras fakan vortaron.

GAZETOJ RICEVITAJ.

AMERIKA ESPERANTISTO, sep.; BRAZILA ESPERANTISTO, maj-jun; ESPERANTO TRIUMFONTO, n-roj. 99-106 FRANCE ESPERANTO, aŭg.-sep, okt.; LA NOVA EPOKO, 1 Tverskaja-Jamskaja 35, kv. 5, Moskvo. Jun.—aŭg. Nova monata revuo, redaktata de komitato inter kiuj troviĝas lingvaj komitatanoj. La enhavo devus gajni por la nova revuo grandan legantaron. La UNUIGITA TUTHOMARO, jul.—aŭg.; La Revuo Orienta, apr., maj, jun. jul. sep.; La Verda OMBRA, jul., aŭg., sep.; LITOVA STELO, aŭg.; L'ESPERANTO, sep.; LE MONDE ESPERANTISTE, jul.—aŭg.; NOVA EUROPO, aŭg.; SVENSKA ARBETAR-ESPERANTISTEN, n-ro. 2. Arguso, aŭg.; Esperanto-Praktiko, sep.; Pola Esperantisto, 19 Krolewska str., Warsaw, Eliras monate. Plejparte esperante, sed kroniko nacilingve okt.; Verda Utopio, jul.-sep.; Literaturo, apr.-jun., jul.-sep.

REPAIRS ATTENDED TO.

Telephone: Brunswick 714

ALFRED KLEIN,

ELECTRICAL CONTRACTOR

ALL KINDS OF INSTALLATIONS. ESTIMATES SUBMITTED.
LIGHT, POWER AND BELLS.

Special Sale of all kinds of Electrical Goods. The right kind of Present for Home and Friends. Irons, Cookers, Torches, &c., &c.

CALL OR WRITE—

660 SYDNEY ROAD, BRUNSWICK, VIC.

Books ! Books ! Books !

Tra la Mondo, Vol 1., 1/3.

Dua Ekzerçaro, 9d.

ORDER NOW!

Send for Price List to Librarian,

Australian Esperanto Association

BOX 731, P.O. ELIZABETH STREET,
MELBOURNE.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. **FREE TO YOU.**

The House of Stead

Early in the year STEAD'S REVIEW will appear in its improved new form with highly finished paper, perfectly printed, and a three-colour cover that will please the eye. We aim at continual improvement for it is to be a production worthy of presenting to Australians. Its price will remain the same.

Announcements.

In the first four months of next year we will produce several New Magazines. Every one will be expertly cared for from the literary standpoint, and we are also determined to produce all our Magazines in high-grade form—good paper, good printing, and fine illustrations.

Fiction Magazine (Monthly).

Elevating and entertaining stories, good pictures and humorous drawings. Anecdotes by British, Australian and American Authors. Probable Price 9d.

Woman's Journal (Monthly).

All for Australian women. Matter will be treated by experts, and Magazine will be a production worth having and well worthy of Australians. It will be beautifully illustrated and will probably sell at 1/-.

Mountain and Seaside (Monthly).

For those contemplating a holiday, this Magazine will be guide, philosopher, and friend. Interesting places throughout Victoria will be written up and illustrated, and full information given. Its pages will be strewn with good stories, sketches and humorous drawings.